

La Esperanto-Gironde Informilo

SEPTEMBRO 2019



N° 159

En majo ĉe Monique!



ESPERANTO-GIRONDE
KUNVENO EN CASTELNAU-SUR-GUPIE
LA 12an DE MAJO 2019
je la 10a30

Ceestis: Jean-Seb kaj Annie Brilleaud, Elvezio Canonica, Frambo Carrieu, Kari-ma Choukairi, Gilbert Darrieux, Janine kaj Yannick Dumoulin, Monique kaj Sylvie Dussenty, Hélène Forget, Gloria Gargallo, Joël Lajus, Klodin' Pomirrol, Marcelo Redoulez, Bernard, Rose kaj Maeva Sarlandie.

Senkulpigitaj: Martine Edelbloude, Christiane kaj Michel Jagueneau, Peio Labbé, Lucienne Laroche, Morine Stride, Bernard Vidal.

Ne hazarde ni veturis ĝis Castelnau-sur-Gupie, ĉarma vilaĝo de Lot-et-Garonne, la 12an de majo: ni kune festis la 80an datrevenon de Monique, en ŝia nova domo, kie ŝi nun vivas kun sia filino Sylvie, kiu bredas kaprinojn por produkti fromaĝon!

Kun Monique kaj Sylvie ni vizitis la bienon, kiu ŝirmas diversajn bestojn, krom la kaprinaro: kapridoj, du belegaj virkaproj, sed ankaŭ ansero, testudo... kaj afabla hundo!

La komuna manĝo estis kiel kutime frandinda, des pli, ke aldoniĝis bongustegaj hejmellaboritaj fromaĝoj!

Post la manĝo, pluraj el ni prezentis tekstojn, poemojn, por festi al Monique, kaj ni iris por paŝado tra la vilaĝo.

Belega, kortuŝega etoso, por neforgesebla tago!
(Vidu la fotoalbumon pp. 14-15)

Janine



Kejkaj anoj de la kaprinaro

Kara nova, 80jara Monique,

Kiu diris dum niaj festoj al tiam 80jaraj Léo kaj Simonne:

«*El la homoj, mi amas laboristojn... Mi amas tiun, kiu el la tero kaj el la nebuleco de sia imago kreas novajn figurojn.*» de Ĝ. Ĥalil Ĥibran'

«*Pli bone pagi kotizon al la grup', ol frankojn mil malŝpari kun diboĉa pup'!*» de Rajmondo Ŝvarc? Ja, ci mem, kara Monique, kiel ero de kolektivo deklamante tekston aŭ poemon.

Ni kunhavas multajn komunajn ŝatokupojn, kaj inter tiuj, kiel NaturgeAmikoj, ni ŝatas piedmigri laŭ padoj tra kamparo kaj sur montoj, aparte Pireneaj. Nin ravas la tie renkontitaj sovaĝaj floroj.

Kara Monique, inter la montaraj floroj, mi scias, ke ci aparte ŝatas heliantemon. Tamen hodiaŭ por tiu speciala tago, ŝajnis al mi pli nature elekti alian floron, ankaŭ diskretan, kiel ci, kaj kun subtila bonodoro, kiun ĝi rezervas al tiuj, kiuj sufiĉe alproksimiĝas. Ĉu ci divenis kiun? Pro cia nova vivmedio ni prikantu kaprifolion, alinome loniceron. La kromnomo *kaprifolio* el la latina *caprifolium* povus deveni aŭ de la fakto, ke kaproj ŝategas la foliojn de tiu planto, aŭ ĉar ĉi lasta emas ĉien grimpi... kiel kapro. La longaj lianoj (ĝis 5 metroj) povas kovri surfacon inter 8 kaj 10 kvadratajn metrojn.

Lonicero – teksto kaj muziko de Nanne Kalma por Kajto duope

Estis sur pontet'
Super malhela kanal'
Kun la bildo de la luno en ĝi
Sed mi forgesis vian nomon
Kaj mi miras kiel vin
En mia animo ne trovas mi.

Longe sufiĉe en brakumo estis ni
La unu sub de la alia sorĉinflu'
La roson arĝentan super la kamp'
Memoras mi
Sed la koloron de viaj haroj ne plu

Ho kara tiel modesta estis vi
Kaj poeto estas kaprica en la kor'
Sed li neniam forgesos
Dum sia tuta viv'
La odoron de la loniceroflor'



O maĝe al cia ekzempla engaĝiĝo, Monique; ci, kiu aktive agadas, pli ol pa-lavre paroladas:

Vanas deklari sen agi

Enkonduko de Oĉjo Zaza: «Se gut' al gut' aliĝas, maro fariĝas.»

aŭ el la poemo *La vojo*: «Eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboras la monton granitan... »

Via deklaro estas
Guto en mondo,
Formika ĉarmo,
Ekpaŝ-plezuro,
Falo de la unua domeno,
Plantita semo.

Tamen el tio rezultas
Ŝaŭmondo,
Formikejsvarmo
Alcela kuro,
Riskoplena, detrua vivspleno,
Belflor-ĝardeno.

Tial ne timu, eĉ se mikroskale,
Ja vortumu kaj agu reale.

*Castelnau-sur-Gupie,
Dimanĉon, la 12an de majo 2019*



Marcelo

Pri la ĉi-supra teksto, Marcelo organizis ludon: ĉiu el ni ricevis version de la poemo, kaj, ne konante la tutan poemon, devis ĝin legi laŭvice, kiel eble plej rapide, kaj nur en la fino, ni malkovris la signifon de la tuto!



Por ci, Monique, kiu nun vivas meze de la naturo, mi elektis tiun poemon, por ke ĉiumatene naskiĝu por ci nova bela tago dum multaj venontaj jaroj:

Paulo Sérgio Viana (brazilano)

Mateniĝo

Vekiĝu antaŭ la tagiĝo.
Iru vidi la unuan sunradion.
Lasu, ke via pupilo malfermiĝu,
Surprizita de la origina lumo.
La helo.
Lumas treme folioj de arbusto,
petaloj,
la roso.
Birdoj pafas sagojn,
la aero pulsas.
Vi vidas la naskiĝon de la mondo.
Kiel feton,
la unuan pluvon de la sezono,
pupon, ranidon,
unuan krion.
Sed ne krii.
Silentu, solene,
antaŭ tiu sceno,
kiun vi privilegie ĉeestas.
Vi ne plu vidos egalan mateniĝon.
Ĝi estas unika.
Atentu.
Spiru profunde.

Janine



Rose (kaj Maeva), Klodin', Joël kaj Gilbert ludis plurvoĉan skeĉon, laŭ la fabelo de la lupoj kaj la sep kapridoj.

La Lupoj kaj la sep kapridoj



Estis iam maljuna kaprino, kiu havis sep idojn kaj amis ilin, kiel ĉiu patrino amas siajn infanojn. Foje ŝi volis iri en la arbaron por alporti nutraĵon. Ŝi alvokis ĉiujn sep kaj diris:

La kaprino

- Karaj infanoj, mi iras en la arbaron, gardu vin bone kontraŭ la lupoj; ne enlasu ĝin, ĉar alie ĝi manĝos vin kun haŭto kaj haroj. La fripono ofte aliformigas sin, sed vi tuj rekonos ĝin per ĝiaj nigraj piedoj kaj ĝia ruĝa voĉo.

La kapridoj

- Kara patrino, vi povas trankvile foriri, ni estos singardaj.

La kaprino eklekis kaj foriris.

Baldaŭ iu ekfrapis la pordon kaj ekkriis:

La lupoj

- Malfermu, karaj infanoj, via panjo alportis ion por ĉiu.

Sed la kapridoj rekonis la lupojn per la ruĝa voĉo.

La kapridoj, ekkriante

- Ni ne malfermos, vi ne estas nia patrino, ŝi havas delikatan voĉon, kaj la via estas ruĝa, vi estas la lupoj!

La lupoj iris en butikon kaj aĉetis grandan pecon da kredo. Ĝi manĝis ĝin kaj ĝia voĉo fariĝis delikata. Ĝi revenis, frapis la pordon kaj ekkriis:

La lupoj

- Malfermu, karaj infanoj, via panjo alportis ion por ĉiu.

Sed, ĉar la lupoj metis sian nigran piedon ĉe la fenestron, la infanoj rekonis ĝin kaj diris:

La kapridoj

- Ni ne malfermos, nia patrino ne havas nigrajn piedojn, kiel vi: vi estas la lupoj!

La lupoj kuris al bakisto kaj diris:

La lupoj

- Mi dolorigas mian piedon, ŝmiru ĝin per pasto.





Post kiam la bakisto faris tion, la lupo kuris al la muelisto kaj diris:

La lupo

- Ŝutu blankan farunon sur mian piedon.

La muelisto pensis: «Ĝi volas iun trompi» kaj rifuzis, sed la lupo diris:

La lupo

- Se vi ĝin ne faros, mi manĝos vin.

La muelisto ektimis kaj blankigis ĝian piedon. Tiaj estas la homoj!

La fripono iris trian fojon al la pordo, frapis

ĝin kaj diris:

La lupo

- Malfermu, infanoj, jen revenis via kara patrino kaj alportis al ĉiu ion el la arbaro.»

La kapridoj ekkriante

- Antaŭe montru vian piedon, ni volas vidi, ĉu vi estas nia kara panjo.

La lupo metis piedon ĉe la fenestron. Kiam la kapridoj vidis, ke ĝi estas blanka, ili kredis al ĉio, kion la lupo diris, kaj malfermis la pordon. Sed tiu, kiu eniris, estis la lupo. Ili ektimis kaj volis sin kaŝi.

Unu saltis sub la tablon, dua en la liton, tria en la fornon, kvara en la kuirrejon, kvina en la ŝrankon, sesa sub la lavujon, sepa en la keston de l' horloĝo.

Sed la lupo trovis ĉiujn kaj sen longaj konsideroj englutis ĉiujn unu post la alia; nur la plej junan ĝi ne trovis, kiu sin kaŝis en la keston de l' horloĝo.

La lupo satmanĝis, foriris, kuŝiĝis sur verda herbaĵo sub arbo kaj ekdormis.

Baldaŭ la kaprino revenis el la arbaro. Kion ŝi ekvidis! La pordo estis larĝe malfermita, la lavujo dispecigita, la kusenoj kaj la kovrilo estis eltiritaj el la lito. Ŝi serĉis la infanojn, sed nenie trovis ilin. Ŝi vokis ilin unu post la alia per la nomo, sed neniu respondis. Fine, kiam ŝi vokis la plej junan, eksonis delikata voĉo:

La plej juna kaprido

- Kara patrino, mi sidas en la horloĝo.

Ŝi eltiris ĝin kaj ĝi rakontis, ke la lupo venis kaj manĝis ĉiujn aliajn. Oni povas imagi, kiel ŝi priploris siajn malfeliĉajn infanojn.

Fine ŝi eliris kun sia ĉagreno el la domo, kaj la plej juna kaprido sekvis ŝin. Kiam ŝi venis sur la herbejon, tie kuŝis la lupo sub arbo kaj ronkis tiel, ke la branĉoj tremis. Ŝi rigardis ĝin de ĉiuj flankoj kaj vidis, ke io moviĝas kaj tremas en ĝia ventro. Ŝi pensis:

La kaprino mallaŭte

- Ĉu miaj infanoj, kiujn ĝi englutis por vespermanĝo, vivas ankoraŭ?



La kaprideto devis kuri hejmen kaj alporti ton-dilon, kudrilon kaj fadenojn. Apenaŭ ŝi ektrancis la ventregon de l' monstro, unu kaprido jam etendis la kapon eksteren, kaj kiam ŝi daŭrigis tranĉi, ĉiuj ses elsaltis unu post la alia. Ĉiuj estis sendifektaj, ĉar la avida monstro englutis ilin vivantajn. Granda estis la ĝojo! Ili karesis la amatan patrinon kaj dancis, kiel la tajloro, kiu festas edziĝon. La kaprino diris:

La kaprino

- Iru serĉi ŝtonojn, ni plenigos per ili la ventron de l' sendia besto, dum ĝi dormas.

La kapridoj rapide, rapide altrenis ŝtonojn kaj ŝovis ilin en la ventron de la lupo. La patrino senprokraste kunkudris ĝin; la lupo nenion sentis, eĉ ne moviĝis.

Kiam la fripono fine satdormis, ĝi leviĝis, kaj ĉar la ŝtonoj kaŭzis al ĝi grandan soifon, ĝi ekiris al la puto: la ŝtonoj ruliĝis kaj bruas en ĝia ventro. La lupo ek-kriis:

La lupo

- Ho, en ventro kia pezo,
Sentas ŝtonojn mi en mezo.
La kapridojn mi ja manĝis,
Kiu ilin tie ŝanĝis?

Ĝi venis al la puto kaj kliniĝis al la akvo por trinki. La pezaj ŝtonoj entiris ĝin en la akvon kaj ĝi dronis. Kiam la sep kapridoj tion vidis, ili alkuris, kriante:

La kapridoj ekkriante

- La lupo mortis! la lupo mortis!

Kaj pro ĝojo dancis ĉirkaŭ la puto.



Monik'

Mi renkontis Monik' tuj post nia reveno el Bora Bora. Mi rekuniĝis kun la kurso de Leo, kien ankaŭ venis, inter aliaj, Gloria. Ek de tiu tempo ni agis por Esperanto. Ni estrariĝis en Esperanto-Gironde, Monik' kiel vic-kasistino kaj mi kiel ĝenerala sekretario. Ni ankaŭ partoprenis en nia unua teatra spektaklo: *Vizito ĉe Oĉjo Georges*, kiun ni prezentis en Amboise. Estis nia unua SAT-Amikara kongreso.

Poste ni organizis kun la grupo plurajn kongresojn, jen SAT-Amikarajn, jen fervojistajn (francan kaj internacian), jen por Esperanto-France. Pro manko da tempo mi ne povis helpi por IKBE. Kompreneble ni daŭre teatrumis, nia lasta prezentado nomiĝis *La magia trajneto*, sed mi ne partoprenis en la registrado de la KD *Survoje*.

De vic-kasistino ŝi iĝis plenplena kasistino kaj mi fariĝis Prezidanto, post la mandato de Joël.

Monik' estis pli fidela ol mi por praktiki ĉiujn lundojn tradukadon.

Nun Esperanto-Gironde estas regita de nova estraro kaj, ekzilita en nova departemento, eble Monik' baldaŭ starigos kurson por vivigi Esperanton en tiu parto de Lot-et-Garonne.

De 1990 ĝis 2019, estas preskaŭ 30 jaroj da belaj renkontiĝoj, da fidela amikeco. 30 jaroj: ni estis junaj tiutempe! Kaj pere de Esperanto certe nia juneco pludaŭros.

Bernardo



**EN CASTELNAU SUR GUIPE ,
OKAZE DE LA ESPERANTO–RENKONTO
ĈE SYLVIE KAJ MONIQUE
KAJ DE LA NASKIĜFESTO DE MONIQUE (2019-05-12a)**

Ni sciis, ke Monique kapablas kalkuli; dum multaj jaroj ŝi respondecis pri la mono, la kaso de nia asocio...

Ni sciis, ke Monique kapablas pentri – eĉ ekspozicii –, kanti (kun Interkant’), teatraĵi (kun la Kompanoj, en la spektaklo pri Brassens)...

Ni sciis, ke Monique ŝatas piediri , piedmigradi sur la padoj, en Pireneoj, en Bouresse kaj en multaj aliaj lokoj...

Ni sciis, ke Monique ŝatas naturon kaj ofte renkontis la naturamikojn...

Sed...

Ni ne imagis, ke iun tagon Monique translokiĝos en veran kamparon por fariĝi kapringardistino!

Kaj...

Ni povas aldoni, ke Esperanto-Gironde kunvenis en multaj diversaj lokoj: en garaĝo, en stacidomo, en festsalono, en kulturcentro, en vitbieno, en kastelo...

Sed neniam en kaprinejo!

Vere, Monique eĉ okdekjaraĝa, ankoraŭ novigas!

Gratulon Monique, kaj bonan sukceson
sur tiu nova vojo, nova pado... al nova vivo!

Joël



KELKAJ NOVAĴOJ DE LA KAPRINEJO DE LA FONTOJ 47

F infine la fromaĝejo estas finita. Sylvie ellaboras siajn fromaĝojn, diversformajn kaj diversnomajn: *chèvretton, palet, bûche, brique, coeur, pyramide, chouquette, crottin, gupie, cabécou, fromage blanc, faisselle*, ktp. Ŝi vendas en la butiketo al lokaj klientoj, al feriantoj, al piedmigrantoj. Plie ŝi liveras en plurajn vendejojn en Marmande aŭ en ĉirkaŭajn vilaĝojn. Ŝi partoprenas en diversaj lokaj manifestacioj, kiel kunmanĝigaj bazaroj, kaj dank'al buŝ'-al-orelo bone iras la komerco.

Tamen ĉio ne ĉiam iras glate. Ĉu pro la somera varmego, ĉu pro aliaj kaŭzoj, iaj fabrikoj devas esti ĵetitaj. Kiom domaĝe! Sed ŝi ne rezignacias. Amikoj bredistoj kuraĝigas ŝin, per konsiloj kaj interŝanĝo de spertoj, ĉar ili mem travivis tion dum sia unua laborjaro, kaj tio povas ankoraŭ okazi, neniuj estas ŝirmita.

La laboro ne mankas: brede la kaprinojn, flegi la vundojn, engarbejigi la fojnon per traktoro, melki, ellabori fromaĝojn, regi la laboristojn (por la domo), la liverantojn, la hazardaĵojn, k.t.p. Fine, estas plej evidente, ke mi vidas ŝin nur por tagmanĝi kaj por vespermanĝi.

La kaprinoj nun iĝas kapricaj, kaj agas laŭ sia propra kapo! Ili saltas trans la barilojn de siaj eksteraj parkoj, revenas internen, kiam ili decidas, ĉar pro la sekeca vetero, ili ne plu trovas bonan herbon. Estas ili, kiuj regas, sed la kapristino ne lasas sin konduki per la nazo!

Pasantan lundon, la 26an de aŭgusto, dramo okazis en kaprinejo en Tournon d'Agenais: 135 kaprinoj pereis en incendio, la kapristo estas ege brulvundita; kaj profunde vundita ankaŭ en sia koro. Niaj kaprinoj devenas el lia bredado, kaj Sylvie havas amikajn rilatojn kun li.

La etoso ĉirkaŭ ni estas plej agrabla. Ni estas dorlotitaj de la najbaroj, de la frukt- kaj legom-produkistoj. Mi kuiradas, kuiradas... Feliĉe ke ekzistas frostujo!

Iom post iom mi rekomencos miajn proprajn okupojn, kaj intencas denove partopreni en traduklaboro de nia cenona grupo.

Ĝis baldaŭ,

Monique, la 28an de aŭgusto



PRI CASTELNAU-SUR-GUPIE

(laŭ informfolio de H. Mayeux kaj A. Bègue, en decembro 2013)

Eta vilaĝo, je 7 kilometroj de Marmande, Castelnau-sur-Gupie estas iama «bastido» (vidu p.13) de la 13a jarcento. Staranta surflanke de monteto, ĝi superas la valon de rivero Gupie, kiu fluas ĉe ĝia piedo. La vilaĝo organiziĝas ĉirkaŭ la ĉefa placo, kies centron okupas ĝia vendohalo kaj la monumento honora al la Franca Revolucio.

En 2010, la loĝantaro nombriĝis 835.



Jam de multa tempo homoj loĝis sur tiu loko: sarkofagoj el la merovida epoko estis malkovritaj apud la preĝejo. La vilaĝo estas unu el la multnombraj bastidoj, kiujn starigis la reĝoj de Anglio, tiam dukoj de Gvijeno, por kontraŭstari la limuzurpojn de feŭdaĵo super la reĝajn posedaĵojn. Ĝia nomo, tiutempe, estis «bastide Saint-Osbert». Kun Artus (alia bastido nun malaperinta), ĝi devis imponi al la apuda fortikaĵo de barono de Mauvezin. La 1an de junio 1276 Eduardo la 1a, reĝo de Anglio, havigis al ĝi ĉarton pri rajtoj («charte des coutumes»), kiu reguligis la vivon de la enloĝantoj.

La unua preĝejo, romanikstila, (nun dediĉita al Saint-Front, evangelizinto de Perigordo) jam ekzistis almenaŭ je la mezo de la 13a jarcento, antaŭ la fondado de la bastido. Ekde tiu fondado, la paroko de Castelnau-sur-Gupie estis la sidejo de komandorejo de la Hospitala Ordeno de Sankta Johano de Jerusalemo, kaj plu estis ĝis la fino de la 16a jarcento.

Plilongige al la murego de la komandorejo de la Hospitaluloj, okcidente, la preĝejo formis norde ĉirkaŭmuron. La tuta konstruaĵo, ĝis la fino de la 15a jarcento, konsistis nur en muregoj, truitaj per embrazuroj, same kiel la aliaj konstruaĵoj de la Ordeno en la 12a jarcento.

La preĝejo estis modifita kaj pligrandigita je la fino de la 15a jarcento (gotika epoko), far la kavaliroj de la Ordeno de Malto, kiuj estis instalitaj en la fortikaĵo apogita al la konstruaĵo.

Ĝis la komenco de la 19a jarcento, la preĝejo kaj la fortikaĵo plu estis ĉirkaŭitaj de fosaĵo. En 1876, nova sonorilturo anstataŭis la ĝistiaman mur-sonorilturon, damaĝitan de fortaj fulmotondroj. De tiam, ne plu restis spuro de la praa preĝejo. Je la fino de la 19a jarcento, estis malkonstruita la komandorejo.



La plej lastaj renoviglaborejoj okazis en 2010-2011.

Adaptis kaj esperantigis Janine

KIO ESTAS BASTIDO?

La vorto «bastido» etimologie venas de okcitana vorto «bastida», kiu origine signifis «nova konstruaĵo». Poste la vorto havas du malsamajn signifojn. En la regiono Provence ĝi nomas kamparajn domojn meze de bieno (ekde la 16a jarcento).


En Sudokcidenta Francio la vorto nomas «novkreitajn urbojn» (ekde la 13a jarcento).

En tiu regiono, dum Mezepoko, oni konstruis inter 350 kaj 400 «bastidojn». Ili staras en la departementoj Ariège, Aude, Aveyron, Cantal, Dordogne, Gard, Gers, Gironde, Haute-Garonne, Haute-Pyrénées, Landes, Lot, Lot et Garonne, Pyrénées-Atlantiques, Tarn, Tarn et Garonne.

Tiuj novaj urboj kreskis ĉirkaŭ «castrum», abatejo aŭ fortika kastelo. Ili foje troviĝas apud riveroj aŭ sur montetoj.

Oni konstruas la «bastidojn» laŭ sama pli malpli ortangula plano, kun kelkaj variantoj laŭ la regionoj, sed ne tro. Laŭ egaleca principo la spaco estas partigita en tri kategorioj da parceloj, krom unu komunuma, la tuto samcentre dispartigita.

Tiuj novaj urboj grave rolas kiel fortikaj urboj kaj foiraj lokoj. Ili signas la respektivajn posedaĵojn de la Angla reĝo kaj Franca reĝo, kiuj devige kunvivadis de post aneksado de Akvitanio fare de Anglio en 1154. Tiu situacio rezultas de la geedziĝo en 1152 de la dukino Aliénor d'Aquitaine (Aljenor de Akvitanio) kun Henri Plantagenêt, kiu iĝas en 1154 reĝo de Anglio.



Ortangula plano de bastido

Evidente, konsekvence, gravaj konfliktoj kontraŭmetas la du malamikajn grupojn. Ĉiu el la du grupoj volas regi la riĉan grundon de Akvitanio. Tial la du reĝoj konstruigas novajn fortikajn urbojn: la «bastidoj». Tiuj estas ĉu anglaj, ĉu francaj, dependas de la posedanto.

Aparta administra sistemo de regado rajtigas imposti la loĝantojn por financi armeojn, kiuj devas sekurigi la landon.

Kompense por akiri fidelecon de la lokaj loĝantoj kaj allogi novajn, la suvereno donas al ili apartajn privilegiojn. Ekzemple: la urbo rajtas organizi semajnan bazaron kaj regulajn jarajn foirojn. La novaj loĝantoj ricevas loĝejon, kultivotan parcelon kaj protekton. Krome la enloĝantoj estas liberaj homoj, nerekvizicieblaj por soldatservi.

El la slipo kunredaktita kaj enpaĝigita de Klodin' Pomirol kaj Marcelo Redulez por la Turisma GvidLibro de Espéranto-Gironde (2013)

MONIKFESTO: LA FOTOALBUMO



Interesa babilado sur la korto



Bona vino ĝojigas la koron de homoj, diras proverbo. Ni aprobas!



La nemaltrafinda pico de la prezidanto...



... kaj la hejmellaboritaj fromaĝoj el kaprina lakto



La du virkaproj



La kaprinaro sur la herbejo



Piedirado tra la vilaĝo

Ludo per respugliĝo sur vojo, kies nomo memoras pri la iama fortikaĵo



Ĉu baldaŭa nova florslipo?

La reĝino de la festo



PIERRE DELAIRE

Ĉi-somere, leginte la nomon de Pierre Delaire en interkruĉigado de ret-mesaĝoj, mi rememoras mian unuan renkonton kun li kaj Esperanto.

Fine de la jaro 1959 mi legis en gazeto Sud-Ouest, (Sud-Okcidento), reklamartikolon pri Esperanto. Tuj tio allogis min. Temis pri “Centre National Esperanto-Office”, kies direktoro estis Pierre Delaire. Mi tuj skribis por havi informojn.

Sed ne ankoraŭ gajnante mian vivtenon, mi ne petis la perkorespondajn kursojn kaj aĉetis mian unuan lernolibron, nome *L'Espéranto en 12 leçons*, 5a eldono, de 1955. Ĝi entenas antaŭparolon de Generalo BASTIEN, intervuojn de Georges Duhamel dum radio-elsendo en 1954, kaj de Maurice Genevoix dum radio-elsendo en 1955. Kompreneble tiam mi ne sciis, ke Pierre Delaire ellaboris la 1an eldonon, kiam li estis nur 16-jara!

Mi do lernis sola, hejme. Sekvantan jaron mi partoprenis nacian konkurson, la dektrian, dank'al kiu mi pasigis tutan semajnon ĉe samideanoj en Nederlando, en la urbo Zaandam, de kie ni vizitis amikojn kaj regionon.

De Orléans ĝis Zaandam, ni, kvar junulinoj Monika, Nicole, Marie-Claude kaj mi, kunveturis en la veturilo de Pierre Delaire. Ankoraŭ nun mi amike korespondas kun Marie-Claude, kiu vivas en la pariza regiono. Estis por mi la unua eksterlanda vojaĝo, pri kiu mi ĉiam emocie memoras. Cetere mi tiam skribis taglibron, kiun mi ankoraŭ havas.

Poste mi aĉetis la duan libron: *Ludoviko en Nederlando*, 2a eldono de 1957, kun antaŭparolo de Marie Bonnafous, profesoro pri beletroj en liceo en Avignon; kaj la trian: *Esperanto, Ariadna fadeno de l' koro kaj de l' spirito*, 1a eldono de 1959, kun antaŭparolo de Maurice Lavarenne, profesoro pri beletroj en fakultato de Clermont-Ferrand.

De tiam mi multe korespondis tra la mondo kaj restis fidela al nia movado.

Tiujn tri librojn, laŭ mi tre kompletaj, mi zorge konservas kaj ofte konsultas.

Monique



Vidu pri Pierre Delaire la vikipedian artikolon:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Pierre_Delaire

EL NIA MESAĜKESTO



Dankegon karaj geamikoj,
pro la sendo de la Ĝirondia revuo kaj pro la aperigo de la alvoko por sub-
teno per la ABONKLUBO...

Tio ege helpas nin, konsciigante homojn pri
la problemoj...

Ĉu eventuale por venonta numero vi povos
aperigi informojn pri la nova albumo ĵus aperinta de
Kjara, nova itala kantaŭtorino... ŝia laboro meritas esti
malkovrigita en la Esperanta mondo kaj ŝia profesieca
kantado certe donos plian valoron al Esperanto-
kulturo...



Ĉiujn informojn pri Kjara vi trovos ĉe: [https://
www.vinilkosmo-mp3.com/eo/kanzono-tradicia-progresiva/kjara.html](https://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/kanzono-tradicia-progresiva/kjara.html)

kaj prezenton de ŝia unua esperanta albumo kun muzikfragmentoj, ĉi tie:
[https://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/kanzono-tradicia-progresiva/kjara/1-blua-
horizonto.html](https://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/kanzono-tradicia-progresiva/kjara/1-blua-horizonto.html)

Plena albumo aŭskulteblas en la justa elsendfluejo (por abonantoj) ĉe:
<https://music.divercities.eu/albums/402807>

Flo!

PS: Mi uzas la telelenson Panasonic, kiun vi helpis akiri, mi estas tre kontenta pri
la rezultoj en mallumaj kondiĉoj (koncertoj kaj spektakloj).

Jen ĉi tie du fotoj faritaj dum la koncerto de Vojaĝo en la SAT-Amikara kon-
greso en la teatro de Montluçon.



MALFERMO DE LA 92A SAT-KONGRESO EN BARCELONO: APARTE FORTAJ EMOCIOJ

La malferma kunveno de la kongreso unue turnis sin al nia seula kamarado Kara An (An Ĝongsu), organizinto de la SAT-kongreso en Koreio en 2017. Per gravaj vortoj Paz dolore raportis pri ĵus okazinta tragika akcidento. La 31an de julio, An Ĝunho, 20jara filo de Kara An, mortis provante savi du laboristojn el certa dronado pro neordinaraj cirkonstancoj. Li volis averti ilin pro tuja vivriska danĝero. Li volis, ke ili ĝustatempe eliru por eskapi katastrofon. Vane. Li mem pereis kun ambaŭ ili. Aŭskultante la tremantan voĉon de Paz, perdinta personan amikon, la silento en la salono eĥis la gravecon de la evento kaj plurloke okuloj larmis. Dum la posta silenta minuto omaĝe al An Ĝunho, kunsente kun Kara An, tuta kongresanaro salutis siajn forajn kamaradojn, partoprenante per mensaj subtenoj la preskaŭ samtempan funebran ceremonion sur malproksima kontinento.

Fine de tiu sama malferma kunsido denove forta emocio tremigis la ĉeestantaron. Pro feliĉo ĉi foje. Juliette Ternant parkeris salutvortojn de sia frato Eduardo Vivancos kaj plej fidele kaj kortuŝe transdonis ilin. Ricevinte la membronumeron 21519, kiam li aliĝis al SAT en 1946, tuj post la dua mondmilito, Eduardo nuntempe estas la plej malnova kotizanto de nia asocio. Naskiĝinte en Barcelono antaŭ 99 jaroj, li de longaj jaroj vivas en Toronto (Kanado), kie li organizis SAT-kongreson en 1973. Ja Eduardo ne plu havas sufiĉe da fortoj por viziti kongresojn, tamen la ĉi-jaraj organizantoj deziris esprimi omaĝon al li. En ĉies kongressako troviĝis speciale eldonita dulingva – Esperanta/hispana – libreto, *Esperanto, lingvo por ĉiuj*, teksto de Eduardo origine publikigita en Venezuelo en 1975. Krome surprize al Eduardo – kaj al la kongresanoj – Xavi organizis publikan telefonadon ĵaŭdon, posttagmeze en Barcelono, matene en Toronto. Dum dek minutoj Eduardo rekte partoprenis speciale al li dediĉitan kongresprogrameron. Juliette kaj Sylvie, lia nevino, estis ravitaj sed ankaŭ malnovaj kamaradoj ĝojis aŭdi la voĉon de subite tiel proksima Eduardo. Fidela je siaj konvinkoj li klare plu esprimas sian fidon al SAT kaj ties celoj.

Marcelo



Telefonado kun Eduardo Vivancos el la Barcelona SAT-Kongreso 2019

92A SAT-KONGRESO EN BARCELONO: REKUNIĜO DE MALNOVAJ - TAMEN NE (TRO) MALJUNAJ – SATANOJ*

SAT-Kongreso estas kutime okazo malkovri la etoson regantan inter membroj de nia asocio, ekkontakti novajn konatojn, pli malpli regule revidi geamikojn, kun kiuj ĉiam pli firmiĝas ligoj, sed ankaŭ retrovi iujn, kiujn la ĉiutaga vivo malproksimigis dum longa tempo. Ankaŭ tiurilate la ĉijara Barcelono kongreso plenumis ĉiujn siajn taskojn! Ja Jose Antonio kaj Maribel, geamikojn el Zaragozo mi ne plu renkontis de post la Internacia Junulara Renkontiĝo de SAT-JunulFako (IJR), okazinta en 1987... do jen okazo rejuniĝi je 32 jaroj! Kaj kiel belaj sentoj akompanas ĉirkaŭbrakojn en tia okazo! Ni konatiĝis septembre 1983 en Paŭo, ĝemelurbo de Zaragozo, dum festo organizita de la loka esperantogrupo por oficiale inaŭguri tian belegan E-monumenton. Sin sekvis pluraj vizitoj dum la postaj monatoj. Mi en Zaragozo oktobre kaj printempe 1984, ili en Ĝirondio julie 1984 por la unua IJR, aŭguste 1985 por mia edziĝo kaj fine do, kiel ĵus skribite en 1987 por SAT-JFeste festi la centjariĝon de Eo. Sed post tio, longa silento. Nia kunligo restis nia SATaneco. Ni vidis de tempo al tempo la nomon de la alia jen en Sennaciulo, jen en la adresaro. Kaj ĉar dum koncerto de Kajto en Teruel Ankie anoncis mian nomon kiel verkinto de kantota teksto, Jose Antonio fine de la spektaklo aliris la kantistinon, kiu sekve ĝoje sendis foton al mi. La interrilatoj tiel reevidentiĝis kaj post kelkaj retmesaĝoj la barcelona SAT-kongreso proponis sin por fizika rekuniĝo. Ja niaj haroj griziĝis aŭ emas malaperi el kapsupro. Tamen kun okuloj brilaj, kiel tiuj de infanoj, ni retrovis nin kaj revokis memoraĵojn de kiam ni estis inter dudek- kaj tridek-jaraĝaj...



*MR 32846 (aliĝinte en 1981 kaj festinte sian 56an naskiĝtagon en Barcelono) kaj JAFZ 32978 (kvazaŭ samaĝulo samtempe aliĝinte).

Marcelo



LA FAJRO KAJ LA LEOPARDO

Teksto el Sud-Ameriko eldonita en la serio Mil jaroj da fabeloj Naturo; Eldonejo Milan.

Jam longe, longe antaŭe, la fajro estis brula, flava kaj flama. Dume, la leopardo estis tute blanka. Ambaŭ estis tre bonaj amikoj. La fajro ĉiam restadis hejme, en roka kaverno kaj la leopardo foje vizitis lin por babili.

Unu tagon, la tute blanka leopardo afable demandis la fajron:

- Kial vi ne vizitus min en mia branĉkabano?

La fajro prudente respondis:

- Mi opinias, ke prefere mi restu ĉi tie, ĉar se mi eliras por promenadi, nenio ajn povas haltigi min.

Tamen la leopardo insistis:

- Mi petas, nur unu fojon, konsentu veni ĉe min!

Tiam la fajro cedis al tento, kaj eliris por promenadi. Trapasante veprojn, li ekbruligis ĉion. Arbaroj flamiĝis kaj herbejoj krepitis... Kiam li fine alvenis antaŭ la kabano, lia impeto ne bremsiĝis. Kiel ajn la leopardo kriis, protestis, petegis, la fajro neniel povis halti. Kaj la kabano forbrulis.

La leopardo sukcesis forfuĝi antaŭ ol rostiĝi. Sed lia bela, blanka felo, ĝis tiam tiel pura kaj brila, subrostiĝis kaj eĉ, nigraj spuroj makulis ĝin.

De post tiu evento la leopardo kaj la fajro malamikas. Ili volas ne plu renkonti sin kaj eĉ klopodas eviti sin. Kaj ankaŭ de post tiu tago la felo de la leopardo estas rufa kaj nigre makulita.

Tradukita de la Cenona Kvinopo 2019.



NIAJ KURSOJ

- A **GUJAN-MESTRAS**, le vendredi de 10h à midi, cours pour débutants, au local attenant au bureau de poste de la Hume, salle de formation, 43 avenue du Maréchal de Lattre de Tassigny 33470 Gujan-Mestras. (06 95 02 85 00)
- A **CREON**, le lundi 15h30 à 16h45 (TAP) et de 18h30 à 20h (pour adultes), Morine STRIDE (06 10 07 08 58)
- En **GALGON**, ĉiun duan vendredon de la 17a ĝis la 19a, Joël LAJUS gvidas kurson por komencantoj kaj progresantoj. (05 57 69 26 96)
- En **CENON** (Kastelo Palmer), ĉiun lundon inter la 14a kaj la 17a, Marcelo REDOULEZ animas tradukgrupon. (05 56 21 38 64)
- En **MONTENDRE**, ĉiun mardon de la 10a ĝis la 12a, Janine DUMOULIN gvidas kurson por ĉiuj niveloj. (05 46 49 45 18)
- En **UNIVERSITATO BORDEAUX MONTAIGNE**, en salono D-009, ĉiun merkredon de la 17a30 ĝis la 19a, kursojn gvidas Elvezio helpe de Jean-Seb. (06 72 17 22 97)





Kie ni ekscios, kiel Renardo kondukis sian kunulon al angilkaptado.

Tio okazis iom antaŭ Kristnasko, kiam tempo venas por pekli ŝinkojn. La ĉielo estis punktita per steloj, la vetero estis frosta, kaj la fiŝbaseno, kien Renardo estis kondukinta sian kunulon estis sufiĉe glaciiginta, tiel ke oni povis tute sekure danci sur ĝi ĝojajn farandolojn. Estis nur unu truo ĉiutage diligente prizorgita de la vilaĝanoj, apud kiu ili lasis sitelon por ĉerpi akvon.

Montrante per la fingro la fiŝbasenon Renardo diris:

- Onklo mia, tie svarmas barbofiŝoj, tinkoj kaj angiloj; kaj trafe jen la kaptilo (li montris la sitelon). Sufiĉas teni ĝin en akvo dum kelka tempo kaj poste eltiri ĝin, kiam oni sentas, pro ĝia pezo, ke ĝi plenas je fiŝoj.

- Mi komprenas, diris Izengreno, kaj pli efikus, mi kredas, kara nepo, alligi la ilon al mia vosto; ŝajnas al mi, ke vi mem tiel agas, kiam vi deziras abundan fiŝkaptadon.

- Ĝuste, diras Renardo, mirigas min, kiel vi facile komprenas. Mi tuj faros, kion vi petas.

Li forte alligas la sitelon al la vosto de Izengreno.

- Nu, nun vi simple restadu senmovi dum unu aŭ du horoj, ĝis vi sentos la fiŝojn amase alveni en la ilon.

- Mi tre bone komprenas; mi laŭbezone paciencos.

Tiam Renardo iom distance sterniĝas sub vepro, kapon inter la piedoj kaj rigardon fiksitan sur sia kunulo. La alia kaŭras rando de la truo, la voston parte mergitan en la akvo kun la sitelo kiel balasto. Sed, ĉar malvarmo estis ekstrema, la akvo baldaŭ malfluidiĝis kaj poste glaciigis ĉirkaŭ la voston.

La lupoj, kiu sentas sin premita, atribuas la kaŭzon al la alveno de fiŝoj; li antaŭĝojas kaj jam revas pri la profito, kiun li ricevos pro mirakla kaptado. Li moviĝas, kaj denove haltas, konvinkita, ke ju pli li atendas des pli multe da fiŝoj li elakvigos. Finfine li decidas eltiri la sitelon; sed liaj penoj estas vanaj. La glacio solidiĝis, la truo ŝtopiĝis, la vosto blokiĝis sen ajna ebleco rompi la obstaklon. Li klopodas kaj baraktas, vokas Renardon.

- Helpon, kara nevo! Tiom da fiŝoj kaptiĝis, ke mi ne sukcesas eltiri ilin. Venu helpi min, mi estas laca kaj baldaŭ tagiĝos.

Renardo, kiu ŝajnis sin dormanta, tiam levas la kapon.



Ilustraĵo de Benjamin Rabier

- Nu, kara onklo, vi plu sidas tie!
Ek, hastu, prenu viajn fiŝojn kaj ni foriru,
ĉar baldaŭ tagiĝos.

- Sed, diris Izengreno, mi ne sukcesas eltiri ilin. Ili tiom abundas, ke mankas al mi la forto por levi la ilon.

- Ha, ridis Renardo, mi komprenas, sed kiu kulpas? Vi volis tro kapti, kaj pravas la kamparano dirante: «Tiu ĉion perdas, kiu ĉion volas».

La nokto pasas, ektagiĝas, la suno lumigas. Neĝo blankigis la grundon kaj S-ro Constant des Granges, honesta vasalo, kies domo apudas la basenon, vekigis kun sia ĝoja servistaro. Li prenas ĉaskornon, vokas siajn hundojn, seligas sian ĉevalon. Ĝojkrioj ŝprucas de ĉiu flanko. Ĉio pretiĝas por ĉasado.

Renardo ne atendas ilin, li lerte reiras la vojon al Maupertuis, lasante en malfavora situacio kompatindan Izengrenon, kiu tiras jen dekstren, jen liven, kaj kruele ŝiras la voston, ne sukcesante liberigi ĝin.

Alvenas knabo kun du rimenitaj leporhundoj. Li ekvidas la lupon kaptitan de glacio je vosto, kun sanganta postaĵo.

- Hoj, Hoj, lupoj!

Tiel avertitaj, la hundestroj alkuras kun pliaj hundoj, kaj dume Izengreno aŭdas S-ron Constant des Granges ordoni malligi ilin. La hundistoj obeas, iliaj sanghundoj impetas kontraŭ la lupon, kiu, kun hirta felo, pretigas sin por efika defendo. Li mordas unujn, tenas aliajn for. Tiam S-ro Constant deĉevaliĝas, alproksimiĝas kun spado enmane kaj intencas tratanĉi Izengrenon. Sed la bato maltrafas. S-ro Constant, mem ŝancelita, surkapen falas kaj tre pene restariĝas. Li resturmas, celas la kapon, la bato preterglitas kaj trafas la voston, kiun ĝi tute detranĉas. Izengreno, suferante akran doloron, streĉas sian forton kaj ĵetas sin inter la hundojn, kiuj flankeniĝas por lasi al li liberan vojon, kaj tuj postkuri lin.

Malgraŭ la tuta hundaro obstina sur liaj spuroj, li atingas altaĵon, de kie li spitas ilin. Ĉiuj sang- kaj lepor-hundoj tiam rezignas sian ĉasadon.

Izengreno revenas hejmen, bedaŭrante la longan kaj vilan voston, kiun li devige forlasis por savo kaj ĵurante venĝi sin kontraŭ Renardo, kiun li eksuspektas esti la malica organizanto de tiuj malagrablaj aventuroj.

FINO

Per tiu naŭa aventuro finiĝas la tradukverko de La Romano de Renardo, far la Cehona grupo.

ESTRARO
de
«ESPÉRANTO-GIRONDE»

* * * * *

Centre Culturel Château Palmer
33150 CENON

* * * * *

Prezidanto: **Elvezio CANONICA**
Université de Bordeaux Montaigne

UFR Langues,

Domaine Universitaire, Esplanade des Antilles,
33600 Pessac

Tel: 06 72 17 22 97 / canonica.elvezio@orange.fr

Sekretariino: **Janine DUMOULIN**

2, chemin des Nauves

Chardes 17130 MONTENDRE

Tel: 05 46 49 45 18 / janinedum@neuf.fr

Kasistino: **Martine EDELBOUDE**

2 rue Raymond Lavigne

33100 BORDEAUX

Tel: 06 73 34 81 88 / mabel1533@laposte.net

* * * * *

Materialon por LEGI bv. sendi al janinedum@neuf.fr
aŭ al esperanto.gironde@free.fr

